Jaro III/VII. N-o 10 (34) Julio 1926

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Fondita en 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

A. N. Nekrasov: La fervojo. Trad. *Gregoro Rozenblat.* — *August Strindberg:* La infero. Trad. *M. Muribo.* — *Av. Isahakjan:* Abu Lala Mahari. Trad. *Gurgeno Sevak.* — *Jack London:* La revo de Debs. — Trad. *V. Elsudo.* — *Mark Starr:* Geografio en Historio.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

La vojo neniam estas glata . . .

La vivo neniam fluas simple . . .

La vicoj de batalantoj neniam restas senŝanĝaj . . .

Rigardu unu post la alia niajn SAT-jarlibrojn. Vidu kiel grandiĝas rapide la numeroj de membro-matrikuloj, dum malpli rapide kreskas nia anaro . . .

Ĉu ni malkuraĝu? Ne, ni trankvile, sed sen kvieto, konstatu, ke iuj alvojiĝas kun ni provizore, aliuj provizore forlasas niajn vicojn, por ripozi kelktempe post streĉa laboro. La vivo ĉiam estas tia . . .

Ni ne malkuraĝu, ĉar ĉiam venas novaj freŝaj fortoj, kiuj pleniĝas niajn vicojn kaj, kvankam nerapide, sed senĉese la nombro de niaj kunbatalantoj kreskas.

Sed oni ne povas esti same trankvila, kiam la vivo sensence kruele ŝiras kamaradojn el niaj batalvicoj . . .

Tiel kruele estas forŝirita el la vicaro nia kamarado *G. Rozenblat*. . . . Iu ero en aeroplana mekanismo difektiĝis, ies kulpo rezultigis la katastrofon . . . Kaj jen nia kamarado, kiu tiel serĉis venki landlimojn ĉu per la lingvo sennacieca, ĉu per aeroplana flugo, — jen li pereis . . .

Ni perdis amikon kaj kunlaboranton de nia revuo. Kiam pereas iu en la batalvico — la kolono ne haltas en sia marŝo. Ni zorgu, ke por okupi la lokon de la perdita kamarado — venu deko da laborardantoj.

Kaj ni zorgu, ke la literatura heredaĵo, kiun lasis k-do Rozenblat al ni, estu modelo kaj instigilo por nia plua laboro. Tiucele ni presas en la nuna kaj en la sekvanta kajeroj poeziajn tradukojn de k-do Rozenblat.

Ne nur kiel funebran memoron pri li, sed kiel instigon al plua laboro . . .

Al ĉiu bato de l' vivo kontraŭ nin ni respondu per nova streĉo de niaj fortoj kaj per nova kresko de niaj vicoj. Tiel ni lernos venki kaj regi la spontanecon de l' vivo. Tiel ni marŝos ĉiam antaŭen, malgraŭ ke la vojo estas malglata. *La Redakcio.*



LA FERVOJO

N. A. NEKRASOV (1821–1877)

Joĉjo — en kuĉera kiteleto:
Paĉjo, kiu konstruis ĉi tiun fervojon?
Paĉjo — en palto kun ruĝa subŝtofo:
Inĝenieroj, karuleto!
(Konversacio en vagono).

Patro! Ĉu lasos en plena nescio
Saĝan Johaĉjon do vi?
Tamen permesu sub luna radio
Diri plenveron al li.
Joĉjo, labor' tiu estis giganta, —
Part' nur de l' inĝenier'!
Estas en mondo la reĝ' minacanta,
Nomo de ĝi — la mizer'!
Gvidas armeojn ĝi, mare — la ŝipojn,
Homojn arigas ĝi kun la persist',
Iras post plugo kaj staras kun vipoj
Post ŝtonhakisto, teksist'.
Ĝi do alpelis amasojn popolajn;
Multaj — en ŝarĝa batal',
Terojn vivigis sen fin' ŝtontavolajn,
Mortis ĉi tie en val'.
Rekta vojet': semaforaj la pintoj,
Reloj, kolonoj, kaban',
Kaj je la flankoj, en tero — mortintoj...
Kiom da ili! Vi scias, Johan'?
Sed... ĵus aŭdiĝis kriad' tondrosona,
Grinco, jen kvazaŭ tra tul'
Ombroj trakuris sur vitro vagona...
Unu . . . alia . . . mortul'!
Tuta amas' antaŭ vojo la ŝtala,
Kuras ĉe flankoj ĝi nun.
Aŭdas vi kanton? . . . En nokto ĉi pala
Bela — fervoj' sub la lun'!
"Ni dum malvarm' kaj varmeg' labor-
Sangis la man' ĉe kubut', [egis,
Vivis sur herbo, malsato nin regis,
Frostis kaj mortis, nin premis skorbut'.
De la dekestroj ni estis suĉataj,
Vergis estraro, premegis mizer' . . .
Ĉion toleris ni, homoj buĉataj,
Pacaj infanoj de l' ter'!
Fratoj! Vi niajn laborojn nun ĝuas!
Putri ni devas en ter' sub glaci' . . .
Ĉu vi pri malfeliĉuloj enuas
Aŭ jam forgesis pri ni? . . ."
Vi ne timigu ilia la kanto!
Jen de Oka' kaj de Volga-patrin'
El diversflankoj de l' regno-giganto
Viaj ja fratoj traflugas sen fin'!
Hontu do timi, post ganto vin kaŝi,
Vi — ne malgranda jam, kara Johan'!
Vidu, jen staras, ne povas eĉ paŝi
Homo malsana, li — blankrusian'.
Lipoj sensangaj, falintaj palpebroj,
De la turment' — plenkalik';
Ĉiam en akvo starintaj dum febro
Ŝvelis la kruroj, en haroj la plik';
Brust' kiel kav', ĉar fosilon kun peno
Premis ĝi tagon post tag' . . .
Vi lin rigardu, Johaĉjo, sen ĝeno:
Pan' ne sufiĉis, malgranda ĉar pag'.
Li ne rektigis la dorson: laboras
Ankaŭ eĉ nun li, en muta silent'
Kaj mekanike la teron traboras,
Fosas kun la diligent'!
Tiun kutimon — nobligan laboron
Sekvi ni devas, ĉar tio — ne pun' . . .
Benu do vi la popolan fervoron,
La laborulon respektu de nun . . .

El la rusa lingvo tradukis Gregoro Rozenblat (†).

LA INFERO

AUGUST STRINDBERG

Enkonduka vorto. Eĉ en la ortodoksa lernejo geografio nun pli gravas ol antaŭe. Multe pli uziĝas en Britlando la mapo kaj la verkoj de s-rino Semple ("Influo de Geografia Medio") kaj aliaj. Sed pli progresas la afero en prolet-studrondoj. Sub la Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj (NCLC) stariĝis centoj da kursoj. La lernolibro "Skizo de Ekonomia Geografio", verkita de J. I. Horrabin kaj eldonita de la Plebs'a Ligo, vendiĝis je 10 000 ekz. kaj estas tradukita rusen, germanen, italen kaj esperanten. La temo tre helpis al la mondlaboristaro kaj pasante pruvas la teknikan kaj ekonomian bazon de alpreno de la lingvo internacia.

La dio Indra estas sendinta sian filinon malsupren al la tero. — Bordo ĉe Mediteraneo; maldekstre en la antaŭparto videbla blanka murbarilo. Branĉoj de oranĝo-arbo peza je fruktoj pendas super ĝi.

En malantaŭaĵo dekstre videbla la blua maro.

Du karbolaboristoj, nudaj ĝis ventro, malpuraj sur vizaĝoj, manoj kaj nudaj korpopartoj sidas ĉiu sur sia trenĉaro.

La difilino kaj advokato en malantaŭaĵo.

La difilino: Ĉi tie estas la paradizo.

1-a karbisto: Ĉi tie estas la infero.

2-a karbisto: 48 gradojn en la ombro.

1-a karbisto: Ĉu ni nin banu?

2-a karbisto: Tio ne estas permesata. La polico venos.

1-a karbisto: Ĉu ni prenu frukton de la arbo?

2-a karbisto: Ne, se vi tion faras la polico venos.

1-a karbisto: Sed mi ne povas labori dum tia varmego; mi foriros de ĉi tie.

2-a karbisto: Se vi tion faros, la polico venos kaj vin prenos . . . *(Paŭzo)* . . . cetere, se vi foriros, vi ne ricevos manĝon.

1-a karbisto: Neniun manĝon? Ni, kiuj plej multe laboras, ricevas plej malmulte da manĝaĵo; kaj la riĉuloj, kiuj nenion faras, ili plej multe posedas. . . . Ĉu tio estas justa? Kion diras la filino de la dioj tie?

La difilino: Mi ne havas respondon. Sed rakontu al mi, kion vi faris, ke vi estas tiel malpuraj kaj ke via sorto estas tiel peza?

1-a karbisto: Kion ni faris? Ni naskiĝis de malriĉaj kaj iom nebonaj gepatroj . . . kiuj eble estis punitaj unu — du foje.

La difilino: Punitaj?

1-a karbisto: Jes; la nepunitaj sidas tie supre en la Kazino kaj manĝas ok manĝojn kun vino.

La difilino (al la advokato): Ĉu tio estas ebla?
La advokato: Vaste rigardate, jes . . .
La difilino: Vi opinias, ke ĉiu homo iafoje dum sia vivo meritus esti metata en malliberejon?
La advokato: Jes.
La difilino: Ankaŭ vi?
La advokato: Jes.
La difilino: Ĉu estas vere, ke ĉi tiuj mizeruloj ne rajtas bani sin en la maro ĉi tie?
La advokato: Jes, eĉ ne survestitaj. Nur tiuj, kiuj sukcesas droni, evitas monpunon. Ĉi tiuj du laboristoj ricevus batojn en la policejo.
La difilino: Sed ili ja povos iri ekster la urbon al la kamparo kaj tie sin bani?
La advokato: Kamparo ne troviĝas. Ĉie estas bariloj.
La difilino: Mi opinias ien, kie estas libere.
La advokato: Nenie estas libere. Ĉio estas okupita.
La difilino: Ankaŭ la maro, la granda, vastega . . .
La advokato: Ĉio. Vi ne povas velveturi sur la maro kaj albordiĝi ie sen riski enskribon kaj monpunon.
La difilino: Ĉi tie ne estas paradizo.
La advokato: Ne, tio estas certa.
La difilino: Kial la homoj nenion faras por plibonigi sian situacion?
La advokato: Ili certe provas, sed ĉiuj pliboniguloj finas aŭ en malliberejo aŭ en malsaĝulejo.
La difilino: Kiujn oni metas en malliberejon?
La advokato: Ĉiujn verpesantojn kaj honestulojn.
La difilino: Kiujn oni metas en malsaĝulejon?
La advokato: Ilian propran malesperon, vidante la senesperon en iliaj penadoj.
La difilino: Ĉu neniu venis al tiu konkludo, ke, laŭ sekretaj kaŭzoj, devas esti tiel, kiel nun statas?
La advokato: Jes, tiuj, kiuj ĝuas bonon, ĉiam pensas tiamaniere.
La difilino: Ke estas sufiĉe bone, kiel nun statas?
1-a karbisto: Kaj tamen ni estas la ĉefkolono de la socio; se ni ne portas al vi karbon, la fajro en la kuirej- kaj salonforno estingiĝas, la maŝino en la fabriko haltas, la lampoj sur strato, en butiko kaj en hejmo estingiĝas; mallumo kaj malvarmo ĉirkaŭas vin . . . kaj tial ni ŝvitas kiel en infero por porti la nigran karbon. Kion donas vi rekompence?
La advokato (al la difilino): Helpu ilin . . . *(Paŭzo)* . . . ke ne plena egaleco povas regi, mi bone komprenas, sed tiom granda diferenco??

(La sinjorino kaj la sinjoro transiras la scenon.)

La sinjorino: Ĉu vi venos por ludi partion?
La sinjoro: Ne, mi devas unue iom promenadi, por ke mi povu iom tagmanĝi.
1-a karbisto: Por **povi** tagmanĝi?
2-a karbisto: Por **povi** . . . ?

(Kelkaj infanoj transiras la scenon; ili krias pro timo, vidante la malpurajn laboristojn.)

1-a karbisto: Ili krias, kiam ili nin vidas. Ili krias . . .
2-a karbisto: Fi. Pro diablo . . . Ni devas eble reeltrovi la skafotojn kaj fari operacion en la putra korpo.
1-a karbisto: Fi. Pro diablo . . . Mi diras refoje: Fi.
La advokato (al la difilino): Estas certe malĝuste. La homoj ne estas tiel malbonaj . . . sed . . .
La difilino: Sed . . . ?
La advokato: Sed la administracio . . .
La difilino (kaŝas sian vizaĝon kaj eliras): Ĉi tio ne estas la paradizo.
La karbistoj: Ne! Ĉi tio estas la **Infero.**

Tradukis *M. Muribo (102)*

ABU LALA MAHARI

AV. ISAHAKJAN

Kvara Suraho

Nokt' alflugis fine, kiel bird-giganto la flugilojn nigrajn dissterninte tuj,
Kaj surkovris plene ĝi la karavanon, kampojn, kiel maroj, longon de la voj'.
Kaj ĉielo granda ĝis la horizonto tute ekpleniĝis per malklar'-malhel',
Kaj nek lun', nek astroj brilis en la supro: la malhelon kvazaŭ kovris nigra ŝel'.
Kaj teruraj ventoj kuris tutlibere, kiel kurĉevaloj sen katen', sen brid',
Kun nubar' plektante polvon kaj sablerojn de rostitaj kampoj en sensenca gvid'.
Tra cipresarbaroj, tra kavernoj, montoj flugis daŭre ventoj kun malgaja muĝ',
Kaj ilia muĝo ŝajnis esti ploro de malĝoja koro aŭ angor-murmur'.
— Iru, karavano, marŝu kontraŭ ventojn, marŝu senhezite kaj ne haltu ci,
Tiel kunparolis mem al sia koro la poeto granda, Abu Mahari'.
— Super mi ekfajfu, vi, severaj ventoj, kaj eksplodu, tondro, super mia kap';
Jen kun nuda frunto antaŭ vi mi staras, do ataku, mi ne timos pro la frap'!
Ne revenos iam mi malvirtajn urbojn, kie bolas, ardas de pasioj mar',
L'urbojn sangoplenajn, kie senkompate hom' dismordas homon eĉ sen eta ŝpar'.
Ho, sovaĝaj ventoj, viajn rostigantajn malafablajn kisojn pli ekŝatas mi,
Ol la hipokritajn kisojn de l' amikoj, ol la falsajn kisojn de la tromp-virin'.
Mia kap' senhejma, ci ja ne reiros, ci ja hejmfajruon mem estingis for;
Ve al homo, kiu havas domon, hejmon, kiel hund' ĉenita estas al la sojl'.
Do, ataku, ventoj, mian patrodomon kaj la fundamentojn skuu for de ĝi,
Polvon disportante tra la tuta mondo: jam la voj' senfina estas dom' al mi.
Mia novpatrujo estas la soleco, kiel hejmtegmento servu la ĉiel',
Mia karavano estu mia domo kaj senhalta vojo — mia ripozej'!
Mia ĉarma vojo, ci eterne sorĉa pro nekonateco, mia novpatruj'.

Min, kun daŭre plora kor', venigu tien, kien eĉ ne foje trafis hom-okul'.
Ci min forkonduku de la fi-amikoj, ili kiel kuloj flirtas ĉirkaŭ vi
Dum suĉotan sangon havas vi, sed kiam ĝi sekiĝas — ili tuj forlasas vin.
Ci min forkonduku de la kamaradoj kaj defendu min de l' falsa varma am'!
Miajn malamikojn konas mi ja bone, mi do sci-evitos de ilia glav'.
Kiu mil dolorojn jen al mi kaŭzigis krom la kamaradoj kaj amikoj-fi,
Kiuj kun la kiso ĉarmis mian koron kaj kun kis' samtempe pikis sage ĝin?!
Kio do en vero estas kamarado? daŭra ĉikanulo kaj spion' al vi;
Ja al vi ne bojas hundoj vin konantaj, tamen bojas homoj, kiuj konas vin.
Estas kamarado, kiu vin envias kaj geedzan liton putras kun malic'!
En sinceraj brakoj flegis mi vipuron... flugu, karavano, kaj ne haltu ci!
Kien ajn ci venos, iru pli antaŭen, iru sen ripozoj, marŝu foren ci!
Mia bona vojo, min ci forperdigu, kune kun suferoj min forkaŝu ci!
Multon mi travivis, mia ĉarma vojo, kaj instruis min la spertoj sen erar',
Ke la bona, sankta kaj majesta aĵo estas la kristala elanima larm'.
Trovu bonan koron ci, kaj kapon metos mi al ĝi kaj ploros tiel ĝis etern'.
Se en tuta mondo sin ektrovus homo, kun malfalsa koro, plena je sincer',
Kaj alvokus min... mi tuj reirus mondon kaj tolerus kion mi malamas nun;
Sed neniu estas, vokas min neniu... Flugu do kameloj en rapida kur'!
Kion ni forlasis en la mond' meritan por reiri tien iam kun sopir'?
Ĉu trezorojn, perlojn, ĉu patrujon, gloron, ĉu potencon, leĝojn kun ordona dir'?
Ĉu komunon homan, homamasojn stultajn, ĉu ni lasis juĝon, domojn de justec'?
Marŝu ci senhalte: nur for-restis tie trompo, hipokrito, ĉenoj de sklavec'!
Kio estas gloro? — Jen hodiaŭ levas vin pli supren, ol la kornoj, — sed
Morgaŭ samaj homoj vin faligas teren por frakasi sub la hufoj de pied'!
Kio estas gloro kaj estimo homa? ja estimas oni nur pro tim' kaj or',
Sed vi provu fali, — polv' el via boto iĝas granda homo, frapas kiel tondr'.
Kio estas riĉo, kiu al stultulo obeigas amon, homojn kun geni'?
Sang' el mil da koroj daŭre elsuĉita, larmo de georfoj, karno de mortint'!
Kio estas patro-lando? — kamp' milita, fi-malliberejo, buĉo kaj sangad'!
Ja pro ĝi fortuloj, faros piramidojn beste el sennombraj miloj da kapar'!
Mi malamas, ve ho, ankaŭ la patrujon, ĝi — paŝtejo frukta por riĉula falĉ',
Dum la sangan teron trapluganta ulo ŝtonon skrap-manĝaĉas kun la ŝtona pan'.
Mi malamas grandan stultan homamason, ĝi despoto estas, malĝentila, sklav',
Baro al·spirito, ankro de perforto kaj sovaĝa besto pro la grandmalsaĝ'.
Kio estas homo-grupo — la komuno? — malamikarmeo, homo — sklav' en ĝi;
Ĝi ja baras flugon al animo via kaj la flirton de la alta pens-medit'.
Ho, komun' malplaĉa, ringo homsufoka, cia bon' — malbono estas vip', terur'.
Ci — tondil' senlima, kiu tondas ĉiujn je grandeco sama, sansimile nur!
Kio estas leĝo, kiun benas homoj? — glavo senkompata en fortula man',
Kiu minac-pendas super malfortuloj pro la interesoj de l' potencular'.
Kun indign' senlima mi malamas homojn, kaj abomenegas min la leĝ' kaj jur'.
Ja per leĝo oni homon perfortigas kaj elsuĉas, glutas ĝin laŭ sama jur'.
Min do ci forigu, de la sangjusteco homa liberigu min sen iu sign'.
Mi preferas, ke la tigr' al mi disŝiru koron, ol la homa just' defendu min!
Mi malamas ege la potencon, ĝi ja estas sangbanejo, de militoj kaŭz',
Estas ĝi sensata homsuĉanto fia, parazit' sensata, homo-manĝegant'!
En pasinto estis, en estonto estos ĝi ekzekutisto granda kun merit',
Fonto de teruro, venĝsoifa lupo, sangavidŝakalo kun da ungoj mil'!
Ĝi subpremas ĉiam homan memestecon, ĉien ĝi atingas, suĉas homon ĝi;
Kiel monstro sidas ĝi sur mia brusto kaj la fruton premas kun forteg' al mi.
Fakte la potenco estas mem ajn ĉio: rajto, jur' kaj leĝo, ankaŭ eĉ justec'.
Estas ĝi eĉ bono, konscienc', malbono, vi nur estas tombo, vi — nur neniec'!
Ja ĉenigis ĉiujn paŝojn niajn, same katenigis langon, penson — la potenc';
Kaj en nom' severa de justec' ĝi buĉas homojn, senhaŭtigas sen aĉdiferenc'.
Vi maltaŭgaj homoj, sklavoj kaj timuloj, eĉ la glavon havi ne meritas vi!
Kiu al vi donis rajton fari venĝon kaj perfortsinjori homojn, kiel vi!
Iru, karavano, mian vean koron ĉe l' serpent' en sablojn enterigu ci,

Kaj forliberigu min de l' fi-potenco, de l' rifuĝo ĝia ekdefendu min!"
— Kaj frenezaj fulmoj per fajraĵaj glavoj trapikadis koron de la nub-masar'.
Kaj en kur' rapida disrompiĝis ili super altaj fruntoj montaj, en malklar'.
Kaj la uraganoj bojis jam terure; palmoj kaj cipresoj muĝis kun murmur'.
Kaj la karavano takte balancante, streĉe, kvarpiede flugis en la kur'.
Kuris ĝi, flugegis ting-tang-ting-tang-ante kaj la vojon kovris per levita polv';
Kvazaŭ ĝi forkuris de l' venĝema pugno de potenc' malbona, por eviti ĝin...

El armena lingvo tradukis *Gurgeno Sevak* (Erivanj).

LA REVO DE DEBS

JACK LONDON

Tagoj sekvis tagojn, kaj dume ĉio-tio estis nur enua. Nenio speciala okazis. La akreco de l' sentiĝoj kaj incitoj pliobtuziĝis. La stratoj plu ne estis superplenaj. La laboristaro plu ne venis en la urbon por observi, kiel ni elportas la strikon. Ne estis jam ankaŭ tiom da aŭtoj tra la stratoj. La remuntejoj kaj la garaĝoj estis malfermitaj, kaj se iu maŝino difektiĝis, ĝi definitive ne estis plu uzebla. En mia maŝino rompiĝis levilo, kaj mi ne povis por kia ajn mono riparigi la maŝinon. Nun, simile al ĉiuj, mi marŝis piede. San-Francisko kvazaŭ formortis, kaj ni ne havis sciigojn pri tio, kio fariĝas en cetera parto de l' lando. Sed nome pro tio ni povis konkludi, ke tie estas la samo kiel en San-Francisko. De temp' al tempo en la urbo estis aperantaj afiŝoj kun proklamaĵoj de l' organizitaj laboristoj, kiuj estis presitaj multajn monatojn antaŭe; tio estis la plej bona pruvo por tio, kiom funde ILU preparis la strikon. Ĉiu etaĵo estis prilaborita. Ĝisnune estis neniu perforto, krom kelkaj kazoj de pafmortigo de l' personoj, kulpaj je faden-difektigo, flanke de l' soldatoj. Sed la popolo en la plej malriĉaj kvartaloj malsatis terure kaj fariĝis pli kaj pli maltrankvila; tio antaŭdiris tre malmulton bonan.

La negoculoj, milionuloj kaj personoj de liberaj profesioj kunvenigis mitingojn, rezoluciis, sed ne estis eble publikigi tion. Ili ne povis eĉ presi la rezoluciojn. La unika rezulto de tiuj mitingoj estis tio, ke la generalo Falsom decidis, okupi per la militfortoj ĉiujn grandajn deponejojn de faruno, greno kaj cetera provizumo. Estis delonge la tempo por tion fari, ĉar eĉ en la hejmoj de l' riĉuloj sentiĝis forta bezono je nutraĵoj; estis necese aranĝi panajn vicojn. Mi rimarkis ke la vizaĝoj de mia servistaro plilongiĝis, rimarkis ankaŭ la terurajn rabojn, kiujn ili estis farintaj el miaj proviz-rezervoj. Efektive, kiel mi tion eksciis poste, ĉiu el ili ŝtelis de mi produktojn kaj aranĝis por si sian personan rezerveton.

Sed kun la apero de l' panaj vicoj venis novaj plikomplikiĝoj. En San-Francisko estis nur difinita rezervo da provizumo, pluse sufiĉe limigita, kiu ne povus sufiĉi por longe. Verdire, ni sciis ke la

organizitaj laboristoj havas siajn privatajn deponejojn; tamen la tuta laborista loĝantaro venis en la panajn vicojn. Rezulte, tiu rezervo da produktaĵoj, kiun sukcesis akiri generalo Folsom, plimalgrandiĝis kun kapturniga rapideco. Efektive, kiel povis la soldatoj distingi malbone vestitan mezklasanon de iu ILU-ano aŭ loĝanto de iu domaĉo. Necesis nutri tiujn kaj aliujn, sed la soldatoj ne sciis ĉiujn ILU-anojn de l' urbo kaj, despli, iliajn edzinojn kaj gefilojn. Estas vero, ke la mastroj helpis rekoni iujn famajn unianojn, kaj ili estis elĵetitaj el la panaj vicoj, sed tio estis guto en maro. La cirkonstancaro ankoraŭ pli malboniĝis, kiam la registaraj trenŝipoj devis ĉesigi la alportigadon de produktoj el Mar-Island kaj Angel-Island, pro la elĉerpiĝo tie de proviz-rezervoj. La soldatoj ricevis nun sian porcion el la konfiskitaj nutraĵoj kaj, kompreneble, ili ricevis ĝin unuavice.

Estis antaŭvidebla la komenco de l' fino. Komenciĝis la senordaĵoj kaj perfortoj. La ordo kaj leĝeco iom post iom malaperis, kaj, plie, necesas konfesi, ne nur inter la elĵetindaĵoj de l' socio, sed ankaŭ inter la superaj klasoj. Sed la organizitaj laboristoj sin tenis en kompleta ordo. Ili sendube havis la eblecon tion fari: ili havis sufiĉe da provizumo. Mi memoras, kiel iufoje tage mi en klubo trovis Halsted'on kaj Brantwood'on pri io interkonsiliĝantajn en angulo. Ili konfidis al mi sian komploton. La maŝino de Brantwood ankoraŭ funkciis, kaj ili intencis veturi ŝteli bovinojn. Halsted havis grandan tranĉilon, kiel ĉe buĉistoj, kaj hakilon. Ni forveturis al la antaŭurbo. Ĉi tie kaj tie estis paŝtataj bovinoj, sed ilin gardis iliaj mastroj. Ni daŭrigis niajn serĉadojn orienten de l' urbo kaj, finfine, trovis nemalproksime de Hunters-Point bovinon, garditan nur de malgranda knabineto. Kun la bovino estis juna bovido. Ni ne perdis tempon vane. La malgranda knabineto kriante forkuris dum ni buĉis la bovinon. Mi forlasas la detalojn, ĉar ili estas tro malbelaj: ni ne estis alkutimigitaj al tiaspeca laboro kaj tial malbone faris ĝin.

Sed dum la plej streĉa momento de nia laboro, ni ekaŭdis kriojn kaj ekvidis kelkajn homojn, kurantajn direkte al ni. Ni forlasis niajn trofeojn kaj ekforkuris. Je nia miro, ili nin ne postkuris. Retroturniĝinte, ni povis vidi, kiel rapidante ili distranĉis la bovinon. Ili venis samcele kiel ni. Ni decidis, ke tie estis sufiĉe por ĉiuj kaj retrovenis. La okazinta poste sceno ne estas priskribebla. Ni interbatis kaj insultis unu la aliun dum la dispartigado kiel sovaĝuloj. Mi memoras, ke Brantwood kondutis kiel sovaĝa besto: muĝis, batiĝis kaj minacis mortigon, se al li ne estos donita konforma parto.

Kiam ni, finfine, ricevis nian parton, okazis ankoraŭ pli neatendita epizodo. Tiun fojon tio estis la apero de policanoj organizitaj en ILU. Ilin venigis kun si la malgranda knabineto. Ili estis ĉiuj armitaj per skurĝoj kaj bastonoj, kaj ili estis multnombraj. La malgranda knabineto saltis ĉirkaŭe en kolero, kvankam larmoj eĉ fluis trans ŝiaj vangoj, kaj kriis: “Batu ilin! Bategu ilin! Jen, ĉi-okulvitrulo tion faris. Batu lian vizaĝaĉon! Batu lin!“ La okulvitrulo estis mi kaj oni,

efektive, frakasis al mi la vizaĝon, kvankam mi suksesis ĝustatempe formeti la okulvitrojn. Nu, ni ricevis bone antaŭ ol ni sukcesis disŝutiĝi ĉiuflanken! Brantwood, Halsted kaj mi forkuris al la maŝino. Ĉe Brantwood la sango ekfluis el nazo, Halsted havis sangozan cikatron sur la vizaĝo pro skurĝa frapo.

Kaj jen, kiam finiĝis la pelĉaso, kaj ni alvenis al la maŝino, ni subite trovis ke post ĝi kaŝiĝis la timigita bovido. Brantwood ordonis al ni esti atentemaj, kaj mem alrampis kvazaŭ lupo aŭ tigro. La tranĉilo kaj la hakilo restis malproksime post ni sur la batalkampo, sed ĉe Brantwood restis liaj manoj, kaj li ruliĝis sur tero kun la malfeliĉa bovideto ĝis li sufokis ĝin. Ni ĵetis la korpaĵon en la aŭton, kovris ĝin per vestoj kaj direktiĝis hejmen. Tamen elmontriĝas ke niaj malfeliĉoj nur komenciĝas. Krevis ĉe ni la pneumatiko. Forestis ia ajn eblo ĝin ripari, kaj interalie venis krepusko. Ni ĵetis for la maŝinon, kaj Brantwood, grakante kaj ŝanceliĝante, marŝis antaŭe, trenante sur la ŝultroj la bovidon kovritan per vestaĵoj. Ni alterne trenis ĉi-bovidon kaj tio preskaŭ nin pereigis. Pluse ni perdis la vojon. Kaj subite post kelkaj horoj da irado, ni renkontis tutan bandon da ĉifonuloj. Ili ne estis anoj de ILU, kaj, mi supozas, estis tiom malsataj kiom ni mem. En ĉiu okazo la bovido trafis al ili, kaj al ni nur batoj. Brantwood furiozis kiel frenezulo sur la vojo hejmen, en ĉiu okazo li similis tian ulon en sia disŝirita vestaro, kun ŝvelinta nazo kaj subfrapitaj okuloj.

Post tio jam ne estis eble ŝteli bovinojn. Generalo Folsom sendis siajn soldatojn, kaj ili konfiskis ĉiujn bovinojn, kaj la soldataro kun la milico formanĝis la plej grandan parton de l' viando. Generalo Folsom ne estis kulpa; lia devo estis subteni ordon kaj leĝecon per helpo de l' soldatoj, kaj tial li antaŭ ĉio estis devigita ilin satigi.

Proksimume tiutempe okazis terura paniko. La riĉaj klasoj forkuris. Ilian ekzemplon sekvis ĉiuj malŝatinduloj, kiuj amase forlasis la urbon. Generalo Folsom estis kontenta. Oni elkalkulis, ke proksimume 200 000 homoj forlasis San-Francisko'n; tio multe plimalakrigis la nutraĵan krizon. Mi tre bone memoras tiun tagon. Matene mi formanĝis nur peceton da pano. Poste mi staris duon tagon en vico kaj nur malfru-vespere mi revenis hejmen, laca kaj rompita, portante kun mi kruĉeton da rizo kaj pecon da ŝinko. Brown renkontis min ĉe la pordo. Li havis timigitan, malgajan mienon. Li deklaris al mi, ke la tuta servistaro estas forkurinta. Nur li sola restis. Min kortuŝis lia fideleco kaj, kiam mi eksciis, ke li nenion manĝis de l' mateno mem, mi dividis kun li mian porcion. Ni kuiris duonon de la rizo kaj ŝinko, dividante ĉion po-egale, kaj lasinte duonon por morgaŭo. Mi kuŝiĝis dormi tute malsata, kaj la tutan nokton maltrankvile turniĝante. Matene mi rimarkis, ke ankaŭ Brown min forlasis kaj — tio estis plej malĝoja — ke li elŝtelis la restintaĵn rizon kaj ŝinkon.

Tiun tagon en la klubo estis tre malgaja ariĝo da homoj. Servistaro tute ne estis. Ĝi tute forperdiĝis. Mi ankaŭ rimarkis, ke perdiĝis la tuta arĝentaĵo. Mi konsideris, ke la servistaro ĝin ne elŝtelis pro tiu

simpla kaŭzo, ke tion pli frue utiligis la membroj de l' klubo. Ilia rimedo estis treege simpla. Sude de l' Merkat-Strato en domoj, loĝataj de ILU-anoj, la mastrinoj donis bonan tagmanĝon ŝanĝe kontraŭ arĝentaĵo. Mi foriris hejmen. Jes, mia arĝentaĵo ankaŭ perdiĝis, — ĉio, krom unu masiva pokalo. Mi envolvis ĝin kaj forportis suden de l' merkato.

Mi ekfartis pli bone post la manĝo kaj retrovenis en klubon por ekscii, ĉu okazis iu situaci-ŝanĝo. Hanover, Collins kaj Dacon ĝuste estis forirantaj. Plu neniu restis, kaj tial ili invitis min, iri kune kun ili. Ili forlasis la urbon, utiligante tiucele la ĉevalojn de Dacon, kaj ili diris al mi, ke estas unu superflua ĉevalo por mi. Ĉe Dacon estis kvar belegaj ĉevaloj, kiujn li deziris savi, ĉar generalo Folsom avertis lin, ke ĉiuj ĉevaloj, restintaj en la urbo, estos sekvanttage konfiskitaj por viando. En la urbo restis tre malmulte da ĉevaloj, ĉar dekmilope ili estis ellasitaj eksterurben, kiam apenaŭ aperis la unua herbo. Mi memoras, ke Birdal, havanta grandegan transport-entreprenon, ellasis al libero ĉirkaŭ tricent trenĉevalojn. Pro meza kosto de ĉiu ĉevalo je kvincent dolaroj, tio prezentis valoron je 150 000 dolaroj. Komence, li esperis, ke li sukcesos revenigi la ĉevalojn post la finiĝo de l' striko; tamen, efektive li retroricevis ne unu el ili. Ĉiujn formanĝis la homoj, forkurintaj el San-Francisko. Samcele oni jam komencis buĉi pro viando la ĉevalojn kaj mulojn, apartenantajn al la milit-trupoj.

Feliĉe por Dacon, en liaj staloj estis grandegaj rezervoj da aveno kaj fojno, kaj tial la ĉevaloj sufiĉe bonstatis.

Ni trovis kvar selojn kaj ni selis la ĉevalojn, kvankam ili estis neniam en rajdo. Trapasante la stratojn de San-Francisko, mi nevole rememoris San-Francisko'n dum la tagoj de l' granda tertremo, kvankam mi devas diri, ke tiama aspekto ne estis tiom terura, kiom nun antaŭ niaj okuloj. Ne la spontanea malfeliĉo estis la kulpo, sed la tiranio de l' laboristaj sindikatoj. Ni transveturis preter Union-Square, preter la kvartalo de l'teatroj kaj magazenoj. La stratoj estis malplenaj. Ie staris aŭtoj, forlasitaj de iliaj posedantoj, aŭ pro iu rompiĝo, aŭ pro manko de benzino. Nenie estis signoj de vivo, krom izolaj policanoj, gardintaj la bankojn kaj publikajn ejojn. Iufoje ni trafis membron de ILU algluintan la lastan proklamaĵon. Ni haltis por ĝin tralegi. Ĝi tekstis:

"Ni, subtenis la ordon dum la striko kaj subtenos ĝin ĝis la fino. La fino venos, kiam niaj postuloj estos plenumitaj, kaj ili estos plenumitaj, kiam ni malsatigante la mastrojn devigos ilin subiĝi, samkiel ili, siatempe, malsatigis nin por devigi nin subiĝi."

— Ĝuste la vortoj de Mussener, — diris Collins. — Nu, se tio koncernas min, mi konsentas subiĝi se nur ili donos al mi la eblecon tion fari. Sed mi eĉ ne memoras, kiam mi estis sata. Estas interese, kia estas la gusto de l' ĉevalaĵo? —

Iom pli malproksime ni haltis por tralegi alian proklamaĵon tekstintan:

"Kiam ni ekvidos ke niaj mastroj konsentas subiĝi, ni denove malfermos la telegraf-rilatojn inter ĉiuj Entreprenistaj Asocioj en Usono. Sed ni transsendos ekskluzive la depeŝojn, koncernantajn la kondiĉojn de l' paciĝo."

Ni daŭrigis plue nian veturadon, transiris la Merkat-straton kaj, plue, rajdis tra la laborista kvartalo. Ĉi-tie la stratoj ne estis dezertaj. Estis eble vidi apud la pordoj de l' domoj, kaj ankaŭ tra la stratoj ILU-anojn, starintajn pogrupe. Gajaj bone nutritaj infanoj ludis surstrate kaj grasetaj mastrinoj sidis sur la ŝtupoj kaj ĉikanis. Ĉiuj rigardis al ni kun moketo. La malgrandaj infanoj kuris post nin kriante:

"He, m a s t e r , ĉu vi ne estas malsata?", kaj unu virino, mamnutrinta infanon, ekkriis al Dacon: "He, dikulo! Se ci deziras, mi regalos cin per ŝinko kaj terpomo, kaj marmelado, kaj pano kun butero, kaj du tasoj da kafo?"

— Ĉu vi rimarkis, — diris Hanover, — ke dum la lastaj tagoj hundoj ne estas videblaj?

Mi tion rimarkis, sed ne ekpensis pri tio pli frue. Estis sendube la tempo por forlasi la malfeliĉan urbon. Ni finfine sukcesis atingi la vojon al San-Bruno, tra kiu ni direktis nin suden. Mi havis somerloĝejon apud Manlow; kaj tien ni ekvojaĝis. Sed baldaŭ ni konstatis, ke eksterurbe estis pli malbone kaj danĝere, ol en la urbo. Tie, almenaŭ, la ordon subtenis la milico de ILU, sed eksterurbe regis plena anarkio. Ducent mil homoj forlasis San-Francisko'n kaj antaŭ niaj okuloj estis sennombraj pruvoj de tio ke ilia forkuro similis la transmigron de akridoj. Ili ĝisradike ĉion detruis. Estis videblaj la postsignoj de ŝtelo, kaj de rabo. Jen tie, jen ĉi-tie tra la vojo kuŝis kadavroj, kaj ĉiupaŝe ni alpuŝiĝis al karbigitaj ruinaĵoj de l' farmejoj. La baraĵoj estis ankaŭ detruitaj, la semaĵojn oni piedpremis. — Ĉiujn bedojn en la legomĝardenoj disfosis la malsataj bandegoj. La hejmaj birdaro kaj bestaro estis forbuĉitaj. Tia estis la stato ĉe la ĉef-vojo, kondukinta el San-Francisko. Je malproksime de l' vojo la farmistoj estis armitaj per ĉas-pafiloj kaj revolveroj, kaj tial ili ankoraŭ konservis siajn havaĵojn. Ili avertis nin kaj rifuzis trakti kun ni. Ĉiu ĉi ruinigo kaj perforto estis la afero de l' manoj de l' sociaj elĵetindaĵoj kaj de l' superaj klasoj. Ja la anoj de ILU, kiuj havis ĉiuj sufiĉajn rezervojn da nutraĵo, trankvile restis en siaj urbaj loĝejoj.

De l' komenco mem de nia vojaĝo ni havis okulfrapajn pruvojn pri tio, kiom senespera estis la situacio. De l' dekstra flanko ni ekaŭdis kriojn kaj fuzil-pafojn. Kugloj fajfis ĉirkaŭ ni. Poste ekaŭdiĝis rompbruo en la arbustaĵoj, kaj belega trenĉevalo elsaltis sur la vojon antaŭ ni kaj forkuris. Ni nur sukcesis rimarki ke ĝi estas en sango kaj lamas. Ĝin pelĉasis tri soldatoj. La pelĉaso daŭriĝis maldekstraflanke de l' vojo. Ni povis aŭdi kiel la soldatoj intervokas. Kvara soldato eliris, lamante, sur la vojon el — dekstraflanke sidiĝis sur altaĵeton kaj komencis forviŝi ŝviton de sia vizaĝo.

— La milico, — ekflustris Dacon. — Dezertoroj!
La homo ekrikanis niaflanken kaj demandis alumeton. Je la demando de Decon, kio estas, li komunikis ke la milicanoj ekdezertoris.
— "Ne estas, kion manĝaĉi! — klarigis li. — Oni nutras nur la regulajn trupojn." Li ankaŭ komunikis al ni, ke oni liberigis la militarestitojn el Alcatraz — Island, ĉar estis nenio por ilin nutri.
Mi neniam forgesos tiun vidaĵon, kiu poste malfermiĝis al niaj okuloj. Ni subite alpuŝiĝis kontraŭ ĝi ĉe abrupta turniĝo de l' vojo. Super niaj kapoj estis foliozaj arboj. La sunradioj penetris tra ilian foliaron. Papilioj postflugis unu la alian, kaj el la kampoj sonis kanto de l' alaŭdo. Kaj samloke staris aŭto. Ĉirkaŭ ĝi kuŝis amaso da kadavroj. Estis facile divenebla kio okazis. La forkurintoj el San-Francisko, veturintaj aŭte, suferis la atakon de bando da rabistoj, kaj estis ĉiuj mortigitaj. Tio okazis ne pli ol tagonokton antaŭe. Malfermitaj ladkestoj de viandaj kaj aliaj konservaĵoj klarigis la kialon de l' atako. Dacon komencis pririgardi la kadavrojn.
— Mi tiel pensis, — diris li. — Mi ja veturis en ĉi aŭto. Tio estas Parryton, la tuta familio. Ni ankaŭ devas nun timi pri ni.
— Sed ni ne havas nutraĵon, kiu allogu ilin, — refutis mi.
Dacon montris al mi la ĉevalon, sur kiu mi rajdis, kaj mi komprenis.
Frumatene la ĉevalo de Dacon perdis hufferon. Ĝia delikata hufo rompiĝis kaj nun ĝi lamis. Dacon rifuzis veturi plue, sed ankaŭ ne deziris ĵeti ĝin. Laŭ lia propono ni daŭrigis la vojaĝon solaj. Li deziris konduki la ĉevalon, tenante la kondukilon, kaj renkontiĝi kun ni ĉe la celloko, ĉe mia somerloĝejo. Mi plu neniam jam vidis lin, kaj neniu iam eksciis kiel li pereis.
Ĉirkaŭ 1 h. posttagmeze ni venis Manlow'on aŭ, pli precize, al tiu loko, kie iam ĝi situis, ĉar tie restis nuraj ruinaĵoj. Ĉie kuŝaĉis kadavroj. La negoca parto de l' urbo, same kiel la plejparto de l' vilaoj, estis tute detruita per la fajro. Nur ie postrestis izolaj vilaoj, sed estis nenia ebleco tien alproksimiĝi. Se ni alpaŝis tro proksime, oni malfermis pafadon al ni. Ni renkontis virinon, kiu disfosis la fumantajn ruinaĵojn de sia vilao. Ŝi diris al ni, ke la unua atako estis kontraŭ la magazenoj kaj, laŭ ŝia prirakonto, ni klare povis prezenti al ni kiel la sovaĝa bestiĝinta kaj malsata homamaso sieĝis la negrandan nombreton da lokaj urbanoj. La milionuloj kaj malriĉuloj batalis man-ĉemane pro la nutraĵo, kaj poste ekbatiĝis inter si, kiam ili estis ĝin akirintaj. Ni eksciis, ke la urbo Palo-Alto kaj la Standfort'a universitato estis rabruinigitaj sammaniere. Antaŭ ni kuŝis ruinigita dezerta lando; ni konsideris, ke plej saĝe estos, direkti nin al mia somerloĝejo, kiu troviĝis tri mejlojn oriente inter la montetoj.
Tamen, veturante plue, ni tuj rimarkis, ke la ruinigo ne limiĝis ĉe la ĉirkaŭaĵoj de l' grandvojo. La larĝa ondo de l' forkurintoj ne kompatis ankaŭ la malgrandajn loketojn; la tuta lokaĵo estis pura, kvazaŭ balaita. Mia vilao estis konstruita el brikaro kaj fer-betono, kaj tial ĝi

ne forbrulis, sed ĝi estis tute rabita. Ni trovis kadavron de la ĝardenisto ĉe la ventmuelejo, ĉirkaŭita de amaso da elpafitaj kartoĉoj por ĉas-fuzilo. Li evidente, bone defendis sin, sed ni ne povis malkovri iun postsignon de miaj du italaj laboristoj, de l' mastrumistino kaj de ŝia edzo. Ne estis eĉ unu viva ekzistaĵo; la bovidoj, ĉevalidoj kaj la tuta hejm-birdaro tute malaperis. La kuirejo kaj la fornoj, kie la homamaso rostis la nutraĵon, prezentis el si ion nekredeblan; krom tio estis videblaj postsignoj de lignofajroj en la ĝardeno, kie la homamaso verŝajne faris sian bivakon kaj pasigis la nokton. Tion, kion ili ne povis formanĝi, ili forportis kun si. Ni ne povis trovi eĉ panereton.

Ni pasigis la nokton vane, atendante Dacon'on, kaj matene defendpafis revolvere al duon-dekduo da rabistoj. Poste ni mortigis unu el la Dacon'aj ĉevaloj, postlasinte por-estonte parton de l' viando, kiun ni ne povis formanĝi. Tage Collins foriris promeni, sed ne revenis. Tio estis terura frapo por Hanover. Li deziris senprokraste forkuri, kaj mi grandpene konvinkis lin atendi ĝis la mateno. En ti-kiu ke la fino de l' striko estas jam nemalproksima, kaj tial mi decidis reveni San-Francisko'n. Tiamaniere frumatene mi disiĝis de Hanover; li foriris suden, havante kun si kvindek funtojn da ĉevalaĵo, alligitaj al la selo, kaj mi kun sama ŝarĝo direktis min norden. La malgranda Hanover iel saviĝis, kaj mi scias ke ĝis la fino de sia vivo li tedos al ĉiuj per siaj rakontoj pri siaj pluaj aventuroj.

Mi veturis tra la grandvojo ĝis Belmont, kiam tri milicanoj forprenis de mi mian rezervon da ĉevalaĵo. Ili diris, ke la situacio ne ŝanĝiĝis kaj la aferoj pli kaj pli malboniĝas. La ILU-anoj havis grandegan rezervon da provizaĵoj kaj ili povis rezisti ankoraŭ dum kelkaj monatoj. Mi sukcesis altreniĝi nur ĝis Baden, kiam mi estis atakita de dekdu homoj, kiuj forprenis mian ĉevalon. Du el ili estis policanoj el San-Francisko, la ceteraj — soldatoj el la regulaj trupoj. Tio estis malbona antaŭsigno. Evidente, la situacio estis ekstreme serioza, se la regulaj trupoj komencis dezertori. Dum mi daŭrigis mian vojaĝon piede, ili estis sukcesintaj fari lignofajron, kaj la lasta el la Dacon' aj ĉevaloj kuŝis buĉita sur la tero.

Je mia malfeliĉo, elartikiĝis unu piedo kaj mi grandpene povis atingi nur ĝis la antaŭurbo de l' suda San-Francisko. Mi pasigis la nokton en iu deponejo, tremante pro malvarmo, en fortega febro; tiel mi kuŝis tie du tagonoktojn, ne kapabla moviĝi de l' loko kaj nur la trian tagon, apenaŭ trenante la piedojn kaj apogante min je improvizita lambastono, mi iel transvenis en la urbon mem. Mi estis tiom malforta ĉar mi ne manĝis tri tagonoktojn. Tio estis ia inkubo. Kiel dum sonĝo, mi memoras, ke preter mi pasis centoj da regulaj trupoj, kaj reciproka —direkte policanoj kun iliaj familioj, por plia sendanĝereco irintaj grandamase.

Veninte la urbon, mi rememoris pri tiu laboristo, al kiu mi vendis mian arĝentan pokalon, kaj direktiĝis tien. Jam krepuskis, kiam mi tien alvenis. Mi transpaŝis la ĝardenon kaj jam leviĝis sur la ŝtuparon,

kiam ekturniĝis la kapo. Mi tamen iel sukcesis frapi la pordon per mia lambastono, post kio mi videble, perdis la konscion. Kiam mi rekonsciiĝis, mi estis en la kuirejo, mia vizaĝo estis superverŝita de akvo kaj iu enverŝis en mian buŝon brandon. Mi sufokiĝis, forkraĉis kaj penis paroli. Mi komencis ion balbuti, dirante, ke mi ne havas plu arĝentajn pokalojn, sed ke mi poste pagos, se ili min nutros. Sed la mastrino min interrompis.

— Kio estas ĉe vi, mizerulo? — diris ŝi. — Ĉu vi ne aŭdis? La striko estas ĉesigita de hodiaŭ matene. Kompreneble, ni nutros vin.

Ŝi ekklopodis, malfermante ladkeston kun fumaĵita ŝinko, kaj prepariĝis rosti ĝin.

— Bonvolu doni al mi peceton tuj, — ekpetis mi.

Kaj mi kun plezuro manĝis pecon da ŝinko kun pano dum ŝia edzo klarigis al mi, ke ĉiuj postuloj de ILU estis plenumitaj. La telegrafa korespondado estis restarigita jam de l' mateno, kaj ĉiuj Entreprenistaj Asocioj cedis. Ĉar en San-Francisko forestis ĉiuj mastroj, anstataŭ ili garantiis generalo Folsom. La trajnoj kaj vaporŝipoj estis veturontaj — de l' morgaŭa mateno, kaj ĉio cetera ankaŭ devis esti restarigita.

Tia estis la fino de l' ĝenerala striko. Mi neniam dezirus ĝin travivi duafoje. Tio estis pli malbona ol la milito. **La ĝenerala striko estas objekto kruela kaj senmorala, kaj la homa prudento povus regi la industrion per pli racia maniero.** Harrisson ĝisnune oficas ĉe mi kiel aŭtogvidisto. Ĝi estis unu el la kondiĉoj de ILU, ke ĉiuj ties anoj reokupu siajn antaŭajn oficlokojn. Brown jam plu neniam revenis al mi, sed la cetera servistaro ĝis hodiaŭ laboras ĉe mi. Mi ne havis la forton eksigi ĉi-mizerulojn, ĉar ili troviĝis en sufiĉe malbona situacio, kiam ili forlasis min kune kun miaj arĝentaĵo kaj provizumo. Kaj nun mi ne povas ilin maldungi, ĉar ili ĉiuj ILU-aniĝis. **La tiranio de l' organizita laboro superas homan paciencon. Necesas ion elpensi!**

Esperantigis *V. Elsudo.*

GEOGRAFIO EN HISTORIO

MARK STARR

La surfaco de la mondo kaj ĝia enhavo rilate al socio — jen la temo de nuntempa geografio. Antaŭe geografio en la lernejo estis naŭziga afero. La kompatinda infano devas parkere lerni liston de urboj, riveroj ktp. Sed homa aŭ ekonomia geografio tute diferenciĝas. Ĝi studas, kiel la tero influas la homaron kaj klarigas la stadiojn de homa evoluo kaj la kreskon de la diversaj nacioj. Laŭ Ratzel "Historio estas nur geografio ekmovigita".

La veno de la sezonoj, de tago kaj nokto dependas de la irejo kaj turniĝo de la mondo ĉirkaŭ la suno. La suno tiras al si mem la akvon el la maro, la lago kaj la rivero. Amasiĝas la vaporo. En la atmosfero okazas; ŝanĝoj kaj sekve kurentoj aeraj. En la nubo la vaporo bloviĝas al la krutmontoj kaj la malvarmo kondensas ĝin. Pluvas, kaj la akvo revenas al la tero. Sen tiu kon-

stanta kaj daŭra agado regado povus ekzisti vivo nek vegeta, nek besta, nek socia. Ĝi kondiĉas la homan historion. Kiel la homo povus ludi sian rolon sen la scenejo?

Sed la tero estas plu ol starpunkto. La dika blanka felo de la urso ĉe la Norda Poluso, ekzemple, kompreniĝas nur rilate al ĝia medio. La ĉirkaŭaĵoj de la dezerta kakto klarigas ĝian pikilaron. La industrion, religion, fizikan formon kaj koloron de iu raso aŭ nacio determinas simile la natura ĉirkaŭaĵo. Ekzemple Britio, la insulo, bredas maristojn kaj ĝia karbo kaj fero donacas al ĝi ŝancon, utili la avantaĝan izolecon el militoj en la Eŭropa kontinento kaj decidis ĝian industrian karakteron. La monoteismo komencis en glata distrikto de la dezerto kaj stepo. Infero al la eskimo kaj la homo, kiu loĝas en malvarma lando, estas loko de malvarmego; kontraŭe, en religio el Palestino la diablo loĝas en loko de varmego. Pro la fortega lumo de la suno la haŭto evoluigas la nigran koloron. Oni povas citi multajn aliajn aferojn sed, pli bone, ni ekzamenu universalan historion per la lumo de geografio.

En la prahistorio, la Glaci-Epoko montras, kiel la homaro dependas de la klimato kaj temperaturo. La faro de iloj distingis, por ĉiam, la homon fundamente de la besto. Besto povas uzi, sed ne fari ilon. Komence la prahomo kolektis berojn kaj radikojn; kaptis fiŝojn kaj ĉasis bestojn. Bredi scipove bestojn estis granda paŝo antaŭen; certa provizo de lakto kaj viando tre gravis. Sed ankoraŭ la homo estas nomado kaj vagis de loko al loko ĉasante, paŝtante. Kiam tribo kreskas al tro granda amplekso, por fari tion sukcese, ĝi dividiĝas; la du partoj ofte en malsimilaj medioj diferenciĝis en lingvo*), kutimo kaj vivmaniero.

Tamen, la historio vere komencis, kiam la homo konstruis urbojn; kiam la nomada paŝtisto kaj la **kolektisto** de nutraĵo fariĝis la terkulturisto en fiksita loko kaj la **produktisto** de necesaĵoj. Kompreneble tre malrapide kaj nekonscie la civilizacio kreskis, sed notinde estas, ke ĝi komencis inter 30 kaj 35 gradoj da latitudo kaj en la rivervalo. Vi rigardu la mapon. Egipto estas en la valo de la Nilo; Asirio en tiu de Tigriso kaj Eŭfrato, Hindio komencis en la valo de la Induso kaj la Ganĝo kaj la ĉinoj antaŭ 3000 jaroj starigis socion sur la bordoj de la Hang Ho kaj aliaj riveroj tie. (En Meksiko kaj Peruo socio evoluis, ĉar necesis kunago por utiligi la akvoprovizon.)

Unue, ni traktu la temperaturon. Nur en la mezvarma zono evoluo povas okazi. En la malvarmega regiono la homo devas barakti eĉ por konservi la vivon; la homa korpo mem iom malgrandiĝas. En la varmega tropika distrikto, la naturo estas en provizo tro abunda; frukto enfalas la buŝon. Abrupte la sezonoj ŝanĝas, kaj la homo ne kutimas antaŭprepari. Eble en varma Afriko aŭ Javo la homa unue staris rekte, sed tie la historio haltis, ĝis la barakto de Okcidentaj Imperioj por kaŭĉuko, nuksoj, stano ktp. vekigis tiujn landojn. Medio necesas en kiu la homo emas kaj devas labori; kiu prezentis al li solveblajn problemojn; kiu kuraĝigis lin eksperimenti; kaj en kiu Naturo ne estas aŭ tro severa aŭ tro dorlotema patrino.

Kial en rivervalo la civilizacio ekplantiĝis? Tial, ke en ĝi troviĝas la fekundeco de la tero, la protekto kontraŭ invadoj, kaj la medio, en kiu kunago devas esti. Konsideru la Nilon. Valo 200 mejlojn longe kaj 6 mejlojn larĝe kuŝas inter dezertoj etendantaj orienten kaj okcidenten, kaj norde estas la maro. Nesciinte kiel navigi la maron la ekstera homo tiam ne povas ataki. Nur malofte armeoj interrompis la historion de Egipto pro tiuj bariloj de dezerto kaj maro. La nomadan paŝtiston tentis la fekundeco de la regule inundita tero. Ĉiujare la rivero provizis la fruktdonan ŝlimon. Volante plene utiligi la riveron kaj iregacii la valon, la egiptanoj, la eksnomadoj, organiziĝis. Socio staris sur pli granda bazo. Specialiĝo de laboro kaj kresko de kastoj kaj klasoj okazis.

---

*) En la Biblio, la fabelo pri Turo de Babelo penas klarigi la diversecon en lingvoj alimaniere.

En Asirio ne tiel suficîs la protekto kiel en Egipto, tial ne tiom regis la la pastraro. Sed la babilonano same uzis la riveron. En Hindio la Himalajo ebligis alian "vartejon por civilizacio". Al ĉinoj la altebenaĵo de Tibeto, "la tegmento de la mondo", donacis riverdevenon kaj protekton. Dum centjaroj en antikva historio baraktis la triboj de la stepo kaj de la monto, por kapti la ĝarden-rivervalon. Ĉinio kaj Hindio estis sufiĉe grandaj por ensorbi la invadinton kaj tial kompare "dormis", dum 3000 miloj da jaroj, ĝis la venkantoj veninte de trans la maro el Eŭropo enkondukis la kapitalistan komercon kaj industrion en la lasta jarcento, ankaŭ la Oriento ne povas dormi plu.

Sed la homo ne tiom rapide tiele venkis la maron, ĉar la dua ĉapitro en homa historio estis verkita en la Mediteraneo. La famaj fenecianoj devenis el dezertpopoloj, kiuj komencis tere kaj mare inter Egipto kaj Asirio kaj ĉe orienta bordo de la Mediteraneo starigis la hejmon de tiuj kolosaj kolportistoj de antikveco, la urboj Tiro kaj Sidono. Aliaj triboj enloĝis parte en la duoninsuloj kiuj en historio nomiĝis Grekio kaj Romo. Sen tajdo la Mediteraneo estas ideala lernejo por la maristo. Ĉirkaŭ ĝi la romanoj unuigis preskaŭ ĉiujn tiam konatajn landojn. Sed la sklaveco de la laboristo, la kreskanta atako de la "barbaroj", kaj la diboĉeco de la regantoj detruis Romon. Imperio bazita sur ekspluatado ne povas longe ekzisti. Eĉ post la disfalo de la Roma Imperio en 400—500 jaroj de nia epoko, la havenoj en la Mediteraneo baldaŭ denove komencis komerci kaj longtempe vendis spicojn, juvelojn teksaĵojn je granda memprofito ĝis la fino de la XV. jarcento. Koncentriĝis la homo evoluo en tiu enlanda maro. Poste alia enlanda maro, la Baltiko, fariĝis centro de komerco kaj rilatis al Rusio.

Tamen, en jaro 1492 komencis nova pli granda ĉapitro en homa historio. Iom post iom la homo lernis navigi, sed li timas iri el vido de la lando. Iel kreskis la ideo, ke la mondo estas enforme globo. Ĉu oni povas atingi Hindion transmare? Tre necesas tio, ĉar turkoj ŝtopis la translandajn irejojn kaj malhelpis la komercon. Fine en la jaro 1492 Kristoforo Kolombo vojaĝis, kaj penante trovi marvojon al Hindio, li trovis novan kontinenton. Pli grave, la oceano fariĝis la vojo ĉien. Ne plu la Mediteraneo restis la centro de la mondeto. Forgesitaj estas la miro kaj gloro greka kaj roma en nova barakto inter aliaj novaj imperioj, kiuj frontas la Atlantikon. Ĝis la Sueza Kanalo (1869) kaj ĝia gravega (al Brita Imperio) vojo al Hindio tre malgrandan rolon ludis lia iama "centro de la tero". Per favorantaj ventoj la ŝipoj tiam transiris la oceanon; poste uziĝis la vaporo, la elektro kaj la oleo. Venkinte portugalojn, hispanojn, holandanojn, francojn, l' britoj starigis Imperion mondvastan kaj bazitan sur estreco de la maro. Britio fariĝis la laborejo, la portanto, la kapitalprovizanto por la tuta mondo. Dank' al ekonomia geografio ni povas kompreni la kialon. Bone lokita insulo, al kiu la Golfa Fluego facile helpas reporti la ŝipojn de la Nova Mondo, Britio neniam suferis la malhelpon de invadarmeo. Ĝiaj bonaj havenoj kaj riveroj malfermis la internon de la lando kaj tre oportune kuŝis karbo kaj fero kune. Sed la patrinlando de kapitalismo naskis idojn; ĝia konsumanto de hieraŭ estas hodiaŭ konkuranto kaj morgaŭ (rilate al Usono) ĝia venkanto.

Sed ankaŭ en Britio estas la homo — kreanto de la nova epoko en tertransporto — la lokomotivo. En la XIX. centjaro per grandaj relvojoj la bordoj de la kontinentoj ligiĝis ne nur transmare sed translande. Dormanta Afriko vekiĝis. Rusoj konstruis la Trans-Siberian Relvojon kaj batalis kontraŭ japanoj, por havi havenon en konstante varma akvo. Usono fariĝis unuo per vaporlokomotivo. Granda relvojo transiris Kanadon. En Eŭropo, per relvojoj, kiuj centris en Berlino, Germanio fariĝis la ĉefa tertransportisto, kaj ĝi faris grandiozan plenon starigi vojon al Bagdado, al la Persa Golfo kaj tiel estri Turkion, kaj Mesopotamion kaj eĉ minaci Hindion — "plej kara juvelo en krono de la brita imperiestro".

Jam ni tro bone scias la rezulton. Milionoj da homoj mortis en dolorego, malsatiĝis, freneziĝis aŭ restis nur vunditoj, blinduloj aŭ kripluloj, ofte petantaj almozon ĉe bordo de trotuaro! La fervojo kompletigis la kreskantan interdependecon de la homaro. Ebliĝas la intermikso kaj interfratiĝo de ĉiu raso. Distanco ne plu baris la reciprokan interkomprenon. Ekfloris la ideo pri lingvo internacia, kaj necesa, kaj praktika. Sed ho ve! konkurantaj imperioj en la barakto por la vendejo, la krudaĵo (nafto, karbo, fero) kaj la gravega strategia vojo oferis la homaron sur la altaro de sia ambicio kaj avareco. Tragedia ja estas fino de la evoluo de civilizacio el rivervalo kaj enlanda oceano ĝis la oceana kaj tertransporta epokoj. Ekonomie la mondo unuiĝas, sed politike 5 grandaj grupoj interbatalas. Nur en unu, en la rusa grupo, regas la laboristaro.

Eble kamarado diras: Jes, tre interesa estas la klarigo pri antaŭa evoluo, sed ĉu ekonomia geografio helpas nin, la laboristaron, nun? Ĉu ĝi ankoraŭ funkcias en la historio? Sen timante kontraŭdiron oni povas responde aserti: "Ĝi ankoraŭ funkcias, kaj la faktoj de geografoj estas faktoro en la Sociala Revolucio mem. Ekzemple en Sovetlando la sama grandeco en areo, kiu venkis Napoleonon, ankaŭ savis la Sovetregistaron en la postmilitaj jaroj. En Hungario estis tute alia afero. Se Britio sole revolucias, ĝi malŝategas post du semajnoj, ĉar tiu lando dependas multe de eksteraj landoj en sia nutraĵprovizado*). Kompreneble estas aliaj faktoroj en la afero. Pli kaj pli la povo de la homaro plue venkas Naturon; laŭvole la homo povas kreskigi vinberojn en Islando; ĉe Norda Poluso, li nun ne mortas pro la malvarmo, sed pafas urson kaj vestas sin en ties felon. Se ne estis ekzistanta la Ruĝa Armeo, spite de distanco, Kolĉak, Denikin ktp. per helpo de ĉiulandaj reakciuloj, hodiaŭ certe regus en Moskvo. Sed la homo devas labori inter la limoj de Naturo. Kostas tro multe da energio, ekzemple loĝi amase en Islando.

Plue antaŭ la revolucio per scio pri ekonomia geografio estas komprenebla la rivaleco inter la imperioj kapitalistoj. Kial Britio per fera kalkanumo subpremis la egiptanojn kaj konstruas egan militŝipejon ĉe Singaporo? La mapo komprenigos vin pri protekto de Sueza Kanalo, kaj de Hindio kontraŭ la japanoj. Ekonomia mapo montras la superecon de Usono en karbo, kotono kaj nutraĵo, ĝi montras ankaŭ, kiel la potencoj volas eniri Ĉinion. La franca buĉado de la marokanoj, la malpaco pri Mesopotamio inter Britio kaj Turkio, kaj multaj aliaj aferoj en mondpolitiko, fariĝas facile travideblaj en tiu lumo. Pli grave oni povas kompreni, kial la Sovetlando haltas pro manko de la maŝino, de la lokomotivo kaj la elektro-aparato; la grandega areo, kiu haltigis en evoluon de Rusio, necesigas helpon el aliaj landoj, por solvi la nunan problemon de tertransporto. Urĝas la internacia organizado laborista por unuigi konscie la mondon. La grandega vaporŝipo, la kablo, la fervojo, la aeroplano kaj la senfadena telefono teknike preparis la vojon. Ne nur teknike, sed ekonomie la diversaj partoj de la mondo unuiĝis kaj interŝanĝas varojn. La scenejo de estinteco, batalejo nuna por konkurantaj Imperioj, la tero nia devas fariĝi loko en kiu nur ĝi mem estas ekspluatata por nutri, vesti kaj hejmi la homaron. La mondlaboristo efektivigu tion per scio kaj kuraĝa ago.

"La Internacio triumfu en tut' mond'."

*

Postnoto de la Redakcio. La samaj ideoj estas pritraktataj en la eldonita de SAT verko "Malgranda Terbiblio". Ĝi ankaŭ bone helpus per siaj mapoj al pli bona kompreno de la presata skizo.

---

*) Sed ĝuste tiurilate ludus gravan rolon la socialaj faktoroj, inter ili la proleta solidareco sennacieca. *N. de la Red.*



Sennacieca Asocio Tutmonda
Eldona Fako Kooperativa

PETRO

Kursa Lernolibro por laboristoj laŭ parola metodo. — Prezo: 0,70 mk. g. inkl. afranko

---

Post la studado de "PETRO" estas rekomendinde por progresuloj tralegi

NI LEGU

Internacia Legolibro. 45 Rakontoj, Poemoj k. Humoraĵoj el 15 diversaj lingvoj, kolektitaj k. aranĝitaj de BRUNULO. — Prezo: 1.— mk. g.

3a Eldono

Nova eldono de

LINGVAJ RESPONDOJ

de Dr. Zamenhof

Plena kolekto de la lingvaj respondoj de Dr. Zamenhof, aperintaj en "La Esperantisto", "La Revuo", "La Oficiala Gazeto" kaj aliaj

Formato 15×21 cm, 94 paĝoj
Prezo inkl. afranko 1.50 mk. g.
sur luksa papero . . 2.25 „ „

Nova eldono! **KABE** Nova eldono!

Vortaro de Esperanto

(Esperanto-Esperanta)

*

Form. 15×21 cm, 184 paĝ., bindita
Prezo inkl. afranko 2.50 mk. germ.

*

Administracio de SAT,
Leipzig O 27, Colmstrasse 1

BALDAŬ APEROS

ETIKO

VERKO DE KROPOTKIN

Ĉ. 240-PAĜA

ĈIU ESPERANTOPAROLANTA LABORISTO
LEGAS LA UNUAN SEMAJNAN
LABORISTAN GAZETON EN ESPERANTO

"SENNACIULO"

Ĉiu dua numero enhavas apartan "Radio"-paĝon
Unufoje dum monato estas aldonata suplementa paĝo: "La Lernanto"

POSTULU PROVNUMERON ĈE
ADMINISTRACIO DE S. A. T.
LEIPZIG O 27, COLMSTRASSE 1, Germ.

Jarabono al "Sennacieca Revuo"

Argentino 3 pesos; Aŭstrio 5 ŝil.; Belgio 15 fr.; Brazilio 7 milr.; Britio 60 penc.; Bulgario 100 lev.; Ĉekoslovakio 25 kr.; Danio 4 kr.; Estonio 300 mk.; Finnlando 30 mk.; Francio 15 fr.; Germanio 3 mk. or.; Hispanio 6 peset.; Hungario 3 or. kr.; Italio 20 lir.; Japanio 2 jen.; Jugoslavio 50 din.; Latvio 4 lat.; Litovio 7 lid.; Nederlando 3 guld.; Norvegio 5 kr.; Polio 4 zlot.; Portugalio 15 esk.; Rumanio 150 lej.; Sovet-Unio 1,50 rubl.; Svedio 3 kr.; Svisio 5 fr.; Usono 1,50 dol.

ABONU ĈE ADMINISTRACIO:
RICHARD LERCHNER
LEIPZIG O 27, COLMSTRASSE 1 (GERM.)
poŝtĉeka n-o 6835

Preseio: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)